



## MALSANOJ DE PLUŜURSOJ

La periodaĵo, *Veterinary Record (Veterinara Registro)*, estas grava kaj respektata brita ĵurnalo de veterinara medicino. Tamen, en 1972 aperis (vol. 90, paĝoj 382-385) en ŝajnerioza stilo leĝera artikolo fare de D.K. BLACKMORE, B.Sc., Ph.D., F.R.C.V.S., D.G. OWEN, M.Sc. kaj C.M. YOUNG, Vet.M.B., M.R.C.V.S. La titolo estis: ***Iuj Rimarkoj pri La Malsanoj de *Brunus edwardii* (nova specio)***. La scienca nomo kreita de la britaj aŭtoroj estas iom anglisma kaj spegulas la oftan anglan nomon por pluŝurso, „Teddy Bear”. „Teddy” estas karesnomo por „Edvardo”. „Bear” estas „urso”. Ĉi tie ni ne plu diskutos la devenon de la nomo.



La dorlotbestoj ekzistas en multaj landoj kaj estas konataj per diversaj nomoj. Tamen, la aŭtoroj opiniis ke la specio estas fakte sama en ĉiuj mondpartoj. Unu atesto pri tio estas, ke jen kaj jen oni sukcesis grefti gambojn, brakojn, eĉ kapon, de unu besto al alia.

La aŭtoroj eltrovis, ke 63,8% el britaj domoj estas enloĝataj de unu aŭ pli da pluŝursoj kaj estas forta korelativeco inter la nombro de pluŝursoj kaj la nombro de infanoj en iu domo. La aŭtoroj provis ekzameni 1598 pluŝursojn kaj akiri detalajn klinikajn antecedentojn; tamen, ili ne povis ekzameni unu pluŝurson pro kvaranteno de la domo (la posedanto suferis rubeolon).

La aŭtoroj ankaŭ serĉis en infanvartejoj kaj malsanulejoj por infanoj en la regiono de Londono kaj trovis 539 diversajn partojn, ofte en malbona stato. Post purigo kaj greftado de la partoj, ili sukcesis restaŭri entute 136 pluŝursojn. Restis unu ekstra orelo, kiun ili konservis en likva nitrogeno por eventuala estonta uzo.

Ili ekzamenis ĉiun specimenon ekstere pri stato de la felo, pri eblaj membromankoj, pri la stato (kaj eble mankoj) de la okuloj kaj oreloj. Ili ankaŭ taksis la staton de la remburaĵo kaj notis iun ŝiron en la felo kun liko de rembura ŝtopaĵo. Ili ankaŭ psikologie ekzamenis la bestetojn, precipe per taksado de la vizaĝmienoj, ĉu la etaj kreaĵoj aspektas feliĉaj.

Tre ofta malsano de la studitaj pluŝursoj estis alopecio aŭ haromanko. La precipa kaŭzo de la alopecio ŝajnis esti troa frotado. Ĉar la plej haromankaj pluŝursoj estis ankaŭ inter la plej feliĉaj (laŭ observitaj mienoj), la aŭtoroj konkludis, ke alopecio ĝenerale respegulas la kvanton de amo inter infano kaj urseto.

Ofte observita sed ne klinike grava malsano estis streĉo kaj plilongigo de unu brako, la rezulto de longdaŭra metodo de transporto.

Unu pluŝurso suferis strangan strabismion. Atenta ekzameno malkovris, ke ĝi perdis unu naturan okulon kaj iu nesperta riparinto penis anstataŭigi ĝin per ŝubutono.

Unu besteto suferis tordon de la nuko kaj mankon de unu brako. Enketo pri la kaŭzo indikis, ke tiu estis rezulto de disputo inter du infanoj pri posedrajtoj.

Unu pluŝurso suferis sindromon de salivosaturita orelo. Oni sukcesoplene resanigis la dorlotbeston per purigo de la orelo kaj milda sekigo en varma loko super la forno.



Kelkaj pluŝursoj suferis psikologian malsanon. La plimulto el tiuj loĝis solaj en polvoplenaj ŝrankoj kaj subtegmentaj fatrasĉambroj. Studo de tiu grupo montris, ke preskaŭ ĉiam la kaŭzo estis neglekto.

La maturiĝanta infano ial perdis intereson iom post iom pri la pluŝulo. Estis tutklare, ke tiuj ursetoj suferis pro manko de atento kaj amo. La aŭtoroj rekomendas tujan adoptigon de la urseto al infano kiu povas ami ĝin kiel la plej bona solvo. Ili asertas, ke „pluŝurso sen amo estas nefeliĉa pluŝurso”.

La aŭtoroj nesurprize konkludas, ke la kuracado de malsanoj de pluŝursoj estas ĝuste en la fako de veterinara medicino kaj ne en tiu de zoologiaj ĝardenistoj. Ili forte kondamnas la ideon, ke ĉiofarantoj kaj fuŝriparistoj rajtas diletanti en delikataj aferoj kiuj vere bezonas profesiajn atenton kaj juĝon. Ili rekomendas tujan starigon de kurso pri malsanoj de pluŝursoj en ĉiuj veterinara fakultatoj.

— Steĉjo

[Mi tre dankas al Marjorie Boulton, kiu sendis al mi fotokopion de la originala artikolo de la veterinara ĵurnalo. – SN]

## SOPIRAS MI SIMPLECON

Jen rozo rava  
kun insektoj voremaj kaj dornoj.

\* \* \* \* \*

Jen homoj pac-celaj  
kun malharmonio inter si.

Jen solvo provinda:  
Mense izoli la plej plaĉajn erojn,  
kaj ilin frandadi  
kiel eble plej ofte.

Jen birdo bluega, vigle saltante;  
Nun celas ĝin kato ĉasema.

\* \* \* \* \*

Doroteo Holland,  
Novembro 2000,  
Kalifornio, Usono

Sopiras mi simplecon  
sciante tamen  
ke ĉe homoj, ĉe bestoj  
ĝi ne ekzistas.

